Mat. 253 24/8/42 ?

la Aliancanoj rompis la rezistojn de la bolŝevistoj defendantaj la pasejojn. Ekspluatante tiujn sukcesojn la germanoj-rumanoj devus baldaŭ atingi la bordon de la Nigra Maro ĉe la dorso de Novorossisk. Aliflanke estas evidente, ke ne nur en tiu punkto, sed en pli larĝa spaco disvolviĝas la germana premo laŭlonge de la Kaŭkaza montoĉeno; sed por paroli pri ĝi ni atendas, ke alvenu oficialaj informoj de novaj antaŭeniroj, kiuj ne devus malfrui.

En orienta Azio kaj en la Pacifiko, estas paŭzo en la tuta regiono regata de la musonoj, kie la japanoj pretiĝas por la rekomenco, je la bona sezono, de siaj ofensivaj planoj; malbonŝancaj klopodoj de la usonanoj por reokupi kelkajn perditajn bazojn (vidu la repuŝitan atakon al insuloj Aleŭtinaj kaj al insulo Gilbert); bataloj en tiuj malgrandaj Salomonaj insuloj, en kiuj usonaj grupoj povis elŝipiĝi, restante, tamen, preskaŭ tute izolitaj.

En norda Afriko nun nenio interesa.

9) FRONTO DE DON - Unu el la specialaj senditoj de "Agenzia Stefani" skribas "Dum la germanaj kirasitaj armeoj kaj la rumanaj divizioj estas venke kompletigantaj sian antaŭeniron en la Kaŭkazon, la italaj divizioj, kiuj de kelkaj monatoj atingis la orientan fronton kaj tie operacias, estas fortikigantaj sin sur la antaŭfiksitaj linioj.

La venka movo de la aliancaj armeoj al la Kaŭkazo estas valide subtenata, norde, de la ofensiva enviciĝo ĉe Don. Tie niaj trupoj alfrontas la malamikoj, kiu vane plurfoje provis transpasi. La penetradoj de la lastaj tagoj efektivigitaj dum la delikata momento de la enviciĝo ĉe la fiksitaj pozicioj estas venke neniigitaj.

La heroaj bataloj subtenataj de la 29° de julio ĝis la 5° de aŭgusto fare de nia divizio "Celere" konsistigis serion da eposaj agoj, en kiuj la braveco, la aŭdaco kaj la manovrebleco de niaj bersaljeroj venkis la kirasojn de la ruĝaj tankoj. La 30.an de julio cento da tre modernaj tankoj enrompis en regionon situantan dekstre de la itala enviciĝo. Kontraŭ ili, leone batalis niaj bersaljeroj. La atako estas repuŝita je prezo de superhomaj klopodoj kaj la malamiko perdis pli ol trionon de siaj fortoj alnajlitaj de la italaj kontraŭtankaj armiloj. En tiu batalo la brava kolonelo Waretto, Komandanto de la 3° Regimento Bersaljeroj, estis mortvundita. Vane la ruĝuloj klopodas perforte eniri tra la linio disiganta ilin de la suda armeo: iliaj ripetitaj atakoj kontraŭ Voronez, firme tenata de la germanaj trupoj, por kontraŭmanovri al okcidento kaj minaci la tutan germanan enviciĝon de Ukraino, mizere fiaskis kun tre gravaj perdoj. Oni kalkulas, ke en la atakoj lastatempe lanĉitaj en tiu sola regiono la ruĝuloj perdis pli ol 1300 tankoj.

Ĉe Don troviĝas nun la italaj trupoj. La bravaj divizioj, kiuj jam kovris sin per gloro ĉe aliaj batalkampoj, estas rekonfirmantaj sian firmecon kaj sian kuraĝon kontraŭ malamiko bonege armita, kaj kiu, skuita pro serio da impresaj malvenkoj, klopodas savi sian sorton per senespera furiozeco.

La longaj kolonoj da militkaptitoj, kondukataj al la postfrontaj regionoj, komprenigas kian krizon de homa materialo estas pasiganta la ruĝa armeo.

La agado de la itala armeo ĉe la orienta fronto estas kompletigata de-

la senĉesa aktiveco de nia aviadistaro. Dum la brayaj ĉasistoj kunlaboras kun la Stukas ĉiutage trafantaj la celojn de Stalingrad, la esploristoj plenumas metodan laboron por fotografi la teritorion antaùstarantan niajn trupojn, aktive kunlaborinte al la kunligo de la diversaj kolonoj antaùenirantaj por atingi la fiksitajn poziciojn.

10) ROMO - Ekzamenante la situacion en Rusujo la "Popolo d'Italia" skribas: "La sovetanoj estas farantaj senesperajn klopodojn por defendi je ĉiu prezo la komunikvojojn de la malalta valo de Volgo, kiuj estas la solaj ankoraù kunligantaj la bolŝevistajn armeojn sudan kaj nordan.

Same la sovetanoj senespere klopodas por malebligi al la eùropaj trupoj la atingon de la bordo de la Nigra Maro kaj eviti, ke ili penetru tro profunde en la montarojn, al la altaj pasejoj, kiuj estas la strategiaj ŝlosiloj de la tuta Kaùkazo. La premo de la germanaj-eùropaj armeoj pludaùras ĉie sen la plej eta signo de malrapidiĝo. Kontraùe la angla-rusa-usona propagando konsentas en la deklaro, ke tiu premo ĉiutage kreskas laù furiozeco kaj intenseco. Moskvo insistas petante tujajn kaj grandajn helpojn de la aliancanoj, kaj memorigas al ili, ke ĝi jam perdis teritorion egalan al la surfacoj de Granda Britujo, de Francujo kaj de Germanujo kune; ĝi perdis proksimume 60 milionojn da loĝantoj; ĝi perdis la tutan agrikulturan potencon de Ukraino kaj ĉiujn rikoltojn de norda Kaùkazo; krome ĝi perdis 50% de siaj rezervoj de fero, kaj 75 procentojn de sia produktado de aluminio. Fine Rusujo memorigas al la aliancanoj la perdon de rimarkinda parto de siaj vojoj kaj fervojoj, kio reduktas al 40 procentoj la moveblecon de la sovetaj armeoj kaj la intensecon de la kunligaj kaj provizaj servoj. El tiuj insistaj vokoj de Moskvo al la aliancanoj, kaj el la silento de la aliancanoj al Moskvo, oni povas dedukti tiun ĉi konkludon: La tutmondaj batalkampoj estas superregataj de la jenaj tri imperativoj:

1°) Rusujo krakas sub la pezo de la grandega militista klopodo plenumita kaj nepre bezonas tujan kaj fortan helpon anglan-usonan.

2°) Anglujo kaj Usono ne povas doni tiun helpon, ĉar ili posedas nek la strategian nek la manan eblecon.

3°) Se Anglujo kaj Usono ne kuras helpi Rusujon, ili riskas perdi sian unuarangan aliancanon, kun ĉiuj ĝiaj eblecoj kaj esperoj. Se, kontraùe, ili ĝin helpas, ili riskas perdi en la afero la bazon, sur kiu estas apogitaj ĉiuj iliaj piedoj kaj fosi la tombon sub siaj piedoj per siaj manoj mem.

12) TOKIO - Ĵurnalo "Niĉi Niĉi", komentariante la militdeklaron de Brazilo al la Akso, skribas, ke tiu ago dependas antaù ĉio de Usono, kies obeema informisto kaj instrumento fariĝis Brazilo. Sed Usono - rimarkas la ĵurnalo - anstataù ricevi helpon de tio, sentos nur pli grandan pezon, dum aliaj gravaj malagrablaĵoj aldoniĝos al tiuj, kiujn jam suferas la popoloj de Ameriko Latina. Ĝi memorigas la manovrojn de longa tempo plenumitajn de Usono en Suda Ameriko por firmigi sian superregecon kaj rimarkigas, ke la enviciĝo de Brazilo kun la angloj-usonanoj neniel modifos nek malhelpos la ofensivon de la Akso en la Atlantiko.